

Konferencaj aliĝoj – la unua limdato proksimas

La 31-an de marto finiĝos la plej favorkotiza aliĝperiodo por la 44-a konferenco de ILEI, kiu okazos la semajnon antaŭ UK en Kopenhago, de la 17-a ĝis la 23-a de julio 2011.

Se vi ne aliĝis, jam tempo estas.

Komparante la nombron de jamaj aliĝintoj kun la samperiodaj aliĝoj el kelkaj antaŭaj jaroj, ni antaŭvidas la plej multnombran ILEI-konferencon en la lastaj 15 jaroj (vidu la tabelon).

	2005	2006	2007	2008	2009	2011
Aliĝintoj ĝis la 8-a de marto	0	11	12	0	11	38
Fina nombro de aliĝintoj	60	74	70	73	78	celo: 100

Laŭlande, la ĝisnunaj aliĝoj jenas:

Belgio – 2 aliĝintoj: s-ino Kristin TYTGAT, s-ro Marc CUFFEZ

Ĉinio – 2: s-ino Jianchao YU, s-ro Yinbao HUANG

Germanio – 4: s-ino Christine SACHS, s-ro Ruediger SACHS, s-ino Monika STROINSKI, s-ro Hieronymus STROINSKI

Danio – 8: s-ino Betty CHATTERJEE, s-ino Ileana SCHRØDER, s-ro Arne CASPER-MORTENSEN, s-ino Zita GARBARAVICENE, s-ino Tara GREGERS, s-ro Bent JENSENIUS, s-ino Malgorzata NITKOWSKA, s-ino Clara JENSEN

Finnlando – 2: s-ino Sylvia HÄMÄLÄINEN, s-ino Synnove MYNTTINEN

Francio – 2: s-ino Monique ARNAŬD, s-ino Odile MASSERON

Kroatio – 3: s-ino ZLATA NANIĆ, s-ino Mirjana Žeželj, s-ino Bojana Đuričić

Hungario – 2: s-ino ENIKŐ ZENGŐ SEREGHY, s-ro Stefan MacGILL

Italio – 1: s-ro Davide ASTORI

Japanio – 1: s-ino Tiekō ISIKAWA

Korea Respubliko – 2: s-ro Jungkee LEE, s-ro Pilgeun YU

Nederlando – 2: s-ro Rob MOERBEEK, s-ro Simon SMITS

Pollando – 1: s-ino Grażyna SZUBRYCZYŃSKA

Rumanio – 1: s-ro Mihai Trifoi

Svedio – 1: s-ino Agneta EMANUELSSON

Usono – 3: s-ro Ronald GLOSSOP, s-ro William HARRIS, s-ro Karlo (Chuck) MAYS

Iom frapa estas malmulteco de aliĝoj el la plej fortaj sekcioj kaj el la landoj najbaraj al Danio, sed espereble tio baldaŭ ŝanĝiĝos.

Kelkaj aliĝintoj donacis ĝis nun entute 1250 EUR al la Kaso Dazzini por helpi partoprenon de malriĉaj konferencanoj. Ili meritas kaj havas nian grandan dankon, kaj estos honore menciitaj en konferencaj dokumentoj. Nun ni estas traktantaj stipendii per tiu mono konferencanojn el Afriko kaj Indonezio, eble ankaŭ iun en malriĉaj landoj de Latinameriko se kolektiĝos sufiĉe da mono.

Specialan rabaton ĝuos ĉiu 10-a aliĝinto – 10% de la kotizo, la 50-a 50%, kaj la 100-a aliĝinto ĝuos 100%-an kotizrabaton. Ili povos ricevi la rabatumon dum la konferenco mem, aŭ povos, laŭ propra decido, donaci ĝin al la kaso “Dazzini” subtene al partopreno de nepagipovaj membroj en ontaj konferencoj. La ĝisnunaj gajnintoj estas: Agneta EMANUELSSON (la 10-a aliĝinto), Tara GREGERS (la 20-a) kaj Monika STROINSKI (la 30-a). Kiu estos la 40-a?

Laŭ la nuna stato de planoj, plejmulto de la estranoj de ILEI partoprenos la konferencon por kontribui kaj gvidi diversajn klerigajn, fakajn kaj organizajn programerojn. Dume alvenis pluraj interesaj kontribuproponoj de aliĝintoj. Bonvolu aliĝi kaj mem proponi viajn programkontribuojn. Precipe ni esperas viajn kontribuojn por la ILEI-tradiciaj interkona manĝvespero, lingva festivalo kaj kultura programo, kaj por traktado de la ĝenerala konferenca temo:

Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado

aŭ por la pli specifa simpozia temo:

Lingvoj de scienca komunikado kaj edukado.

Orientiga programskemo

Dimanĉo, 2011-07-17: alvenoj

Posttagmeze: registrado de konferencanoj

Vespere: Interkona vespermanĝo

Lundo, 2011-07-18: malfermo

Antaŭtagmeze:

-- solena malfermo

-- enkonduka prelego pri la konferenca temo

Posttagmeze:

-- kleriga, faka kaj organiza programoj en tri paralelaj programstrioj

-- Tagkonkluda plenkunsido

Vespere: dana vespero

Mardo, 2011-07-19: plena labortago

Antaŭtagmeze:

-- Enkonduka plenkunsido

-- kleriga, faka kaj organiza programoj en tri paralelaj programstrioj

Posttagmeze:

-- kleriga, faka kaj organiza programoj en tri paralelaj programstrioj

-- Tagkonkluda plenkunsido

Vespere: internacia vespero

Merkredo, 2011-07-20: ekskursata tago

Dumtagee:

-- ekskursoj

-- eventualaj alternativaj programeroj por neekskursantoj

Vespere: distra vespero

Ĵaŭdo, 2011-07-21: lingvofestivala tago

Antaŭtagmeze:

-- Enkonduka plenkunsido

-- kleriga, faka kaj organiza programoj en tri paralelaj programstrioj

Posttagmeze: Lingva festivalo

Vespere: Bankedo + alternativa vespera programo por kiuj ne bankedos

Simpozio: Lingvoj de scienca komunikado kaj edukado

Vendredo, 2011-07-22

08:00 – 10:00 Registrado de partoprenantoj
10:00 – 10:30 Solena malfermo
10:30 – 10:00 F. Gregersen: Nordia politiko pri lingvoj de scienca komunikado: defioj de ĝia realgado en Danio
11:00 – 11:30 Diskuto
11:30 – 11:45 Kafpaŭzo
11:45 – 12:15 H. Tonkin: Lingva malegaleco en la scienco
12:15 – 12:45 Diskuto
12:45 – 14:00 Lunĉpaŭzo
14:00 – 14.30 R. Phillipson: Rezisto al la fortoj malantaŭ la angla kiel imerialisma lingvo de scienca komunikado
14:30 – 15:00 Diskuto
15:00 – 16:00 Prelegoj de invititoj kaj aliĝintoj
16:00 – 16:15 Kafpaŭzo
16:15 – 18:15 Prelegoj de invititoj kaj aliĝintoj
18:15 – 19:30 Paŭzo
19:30 – 21:00 Vespera programo: adiaŭa vespero
Alternativa ekskursa programo estas proponata al tiuj kiuj ne deziras partopreni la simpozion.

Sabato, 2011-07-23

09:00 – 10.30 Prelegoj de invititoj kaj aliĝintoj
10:30 – 10:45 Kafpaŭzo
10:45 – 12:15 Ĝenerala diskuto kaj konkludoj
12:15 – 12:30 Paŭzo
12:30 – 13:00 Solena fermo de la simpozio kaj konferenco

La simpoziaj prelegoj kaj konkludoj estos publikigitaj kiel Simpoziaj aktoj en la serio *Sciencaj kajeroj* de ILEI elektronike kaj laŭeble en presita formo.

Venu kaj ĝuu la amikan etoson de E-einstruista medio. Partoprenu kaj kontribuu al la konferenca programo kaj al agado de ILEI.

Bunvolu uzi la retan aliĝilon:

<http://ilei.info/konferenco/alighilo2011.php>

aŭ la paperan el IPR 2010/4.

La 8-an de marto 2011.

Radojica Petrović, estrarano pri konferencoj.
radojica.petrovic.rs@gmail.com